
LSG FORUMO n-ro 132 (2/2006)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj




Kongresa programo por ni p 3

Por la ĝeneralkunveno p 3

Proponoj al la kunveno 3
LSG-anoj aliĝintaj ĝis nun 3
Propono de tagordo por la kunveno 3
Statuto de LSG 4
La estraro de LSG agis 6

Ministrado de Manĝaĵo por la Animo p 7



Nova libro pri gejeco en
Proksima Oriento 2
Beletra niĉo 6
En Egiptio dum la 18a dinastio 8
Retaj novaĵoj 8

## L. S. G.
## Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**Retejo:** http://lsg-esperanto.org
**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.
**Membriĝo:** Kontaktu la sekr.-kasiston.
**Kotizo:** 10 EUR/1 jaro, 25 EUR/3 jaroj.

### ESTRARO

**Prezidanto:**
Arnold VICTOR, Apartment. 1, 160 West Eleventh Street, New York City, New York 10011, Usono;
arvimide(ĉe)earthlink.net
**Sekretario-kasisto:**
Rolf, Germanio, lasekretario(ĉe)gmx.net / lakasisto(ĉe)gmx.de
**Estrarano pri varbado:**
Francis, Francio,
fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr
**Estrarano:**
Torstein, Norvegio,
kvakke(ĉe)hotmail.com
**Retprizorganto:**
Randy Dean, Usono,
randy.dean(ĉe)pobox.com

### FORUMO – membrogazeto de LSG N-ro 132 (2/2006)


**Adreso, retpoŝto, provizora redaktanto:**
Andreas, Svedio,
...@....com

**Kontribuoj** al la gazeto ĉiam bonvenaj. La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.

**Ekspedo de FORUMO:** La sekretario-kasisto, vidu supre. Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto, se estas ĉeĥa adreso! La persono ne estas ligano. Ni nur forsendas la gazeton el Ĉeĥio pro la tieaj favoraj poŝttarifoj.

## Nova libro pri gejeco en Proksima Oriento

En 11a de majo aperos nova anglalingva libro: Unspeakable Love – Gay and lesbian life in the Middle East (Nemenciebla Amo – Geja kaj lesbanina vivo en Proksima Oriento) de Brian Whitaker, kies enhavo sendube interesos multajn el ni. Ĝi pritraktas la ankoraŭan tabuecon de samseksa amo en tuta Arabujo/Mezoriento kaj la struteskan aliron al ĝi de oficialuloj, religiaj kaj aliaj, fakte de preskaŭ ĉiuj en tiaj fermitaj socioj. La koncernaj ”viktimoj” de tiu politiko estas kondamnitaj sekvi sekretajn, ofte danĝerplenajn vivojn – esti vipitaj, enprizonigitaj, elpelitaj el la familia rondo, ”kuracitaj” de psiĥiatroj, trudedzigitaj ktp. Ni estu senfine dankaj, ke la plimulto el ni vivas jam en pli akceptemaj kaj malfermitaj socioj, sed ni ankaŭ estu plene konsciaj, ke ne por ĉiuj la vivo jam estas tia.




*Brian (el lsg-ano)*

Fonto: http://www.al-bab.com/unspeakablelove/
Libro: Unspeakable Love – Gay and lesbian life in the Middle East de Brian Whitaker, eldonota de Saqi Books,
ISBN: 086356819X.
Havebla ĉe:
http://www.saqibooks.com/ItemsStore.asp?sku=086356819X

http://www.amazon.co.uk/exec/obidos/ASIN/086356819X/yemengateway08/026-9731897-9910836

## Kongresa programo por ni

*Marko kaj Mauro en Italio proponas al la anoj de LSG apartan programon (tamen ankoraŭ provizoran) dum la venonta UK en Florenco.*

**Lundon 31an Julio 2006**
Akcepto en la GLAT-asocio "IREOS" en Florenco (adreso: Via de' Serragli 3):
– 19h00 akcepto kaj aperitivo
– prezento de la asociaj agadoj (kaj Ireos kaj LSG)
– sekvos bufeda vespermanĝo en la sama loko

**Merkredon 2an Aŭgusto 2006**
Ekskurso al Lucca – Pizo (Pisa) – Torre del Lago
– 9h00 ekiro per aŭtobuso
– vizito al la urbo Lucca
– tagmanĝo en memserva manĝejo survoje al Pizo
– vizito al kelkaj monumentoj de Pizo
– pluiro al Torre del Lago
– eventuala vizito al Puccini-loko(j)
– vespermanĝo en gej-amika restoracio
– reveno plej malfrue je 23h30

La kosto de la ekskurso dependos de la nombro de partoprenantoj, kaj ĉiu pagos sian manĝon. Estos tamen verŝajna kosto po inter 55 kaj 70 EUR.

Por realigi la ekskurson, ni devas baldaŭ ekscii la nombron de la partoprenantoj. Bv anonci vin kiel eble plej baldaŭ al:

Mauro, <maurort(ĉe)infinito.it>

*Mauro*



Torre del Lago

## Por la ĝeneralkunveno

*La ĝeneralkunveno de LSG okazos lige kun la Universala Kongreso en Florenco, Italio, 29 julio – 5 aŭgusto. Ekzakta tago, horo kaj loko venos en la venonta numero de Forumo, kune kun la agad- kaj spezraporto. Pro la statuto ni devas kunsendi la tagordon jam en ĉi tiu numero.*

### Proponoj al la kunveno

Neniuj proponoj venis al la estraro.

### LSG-anoj aliĝintaj ĝis nun

Pli ol 35 LSG-anoj el 17 landoj aliĝis ĝis meze de aprilo por la UK en Florenco.

### Propono de tagordo por la kunveno

1) Elekti protokoliston, se la sekretario ne ĉeestas
2) Akcepti aŭ ŝanĝi la tagordon
3) Trovi raportistojn por:
   a) Kongresa Kuriero
   b) La Esperanta gazetaro
   c) Nacilingvaj gejaj gazetoj
4) Trakti la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno
5) Trakti raporton kaj spezojn por la jaro
6) Trakti eventualajn landajn raportojn
7) Diskuti la agadojn de LSG kaj ĝian estontecon
8) Decidi la financan estontecon kaj la jarkotizon
9) Elekti Prezidanton, Kasiston, Sekretarion kaj maksimume 4 Komitatanojn
10) Debati eventualajn rezoluciojn
11) Eventualaj aliaj aferoj
12) Decidi pri dato kaj loko de venonta ĝenerala kunveno
13) Omaĝo al forpasintaj LSG-anoj
14) Fermi la kunvenon

## STATUTO de LSG



*Akceptita de la unua konferenco de la asocio en Twickenham, Britio, la 10-an de aŭgusto 1979.*

*§ 1 Nomo kaj lingvo*

La nomo de la asocio estas "Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj", mallongigite "L.S.G". La lingvo de la asocio estas la internacia lingvo Esperanto.

*§ 2 Bazaj principoj*

La asocio estas politike neŭtrala kaj bazas sian agadon sur la "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj", emfazante ke ankaŭ gejeco estas inkluzivita en la artikoloj 1-a kaj 2-a:

Art.1 Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devas konduti unu al la alia en spirito de frateco.

Art.2 Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵo, naskiĝo aŭ alia stato (...)

La asocio ne estas neŭtrala rilate krimojn kontraŭ la homrajtoj, specife lingvan kaj kontraŭgejan diskriminacion, ekzemple persekutojn kontraŭ esperantaj aŭ gejaj individuoj aŭ organizoj. La asocio konsideras Esperanton necesa por egalrajtigi la diversajn kulturojn de la mondo, kaj konsideras gejecon valora kaj inda vivmaniero.

*§ 3 Celoj*

La asocio celas:

krei internaciajn solidarecon kaj kunlaboron inter siaj membroj, tiel ankaŭ subtenante ilian agadon por la disvastigo de Esperanto kaj por la plena integriĝo de gejeco en la socio.

labori por forigo de lingva diskriminacio, informante pri la lingvo-problemo kaj ĝia solvo per Esperanto en geja medioj.

labori por forigo de kontraŭgeja diskriminacio, informante pri la signifo, valoro kaj problemoj de gejeco en la Esperanta medio.

*§ 4 Membroj*

La asocio konsistas el aliĝintaj individuoj kaj asocioj/institucioj. Aliĝi povas ĉiu, kiu aprobas la bazajn principojn de la asocio kaj subtenas ĝiajn celojn. Membro estas ĉiu, kiu pagis kotizon (se ne nuligita) por la koncerna jaro.

Membro, kiu kontraŭlaboras celon de la asocio povas esti eksigita de la ĝeneralkunveno laŭ propono de la estraro aŭ triono de la membraro. La eksigoto rajtas skribe aŭ parole pledi por sia membreco.

Celante bonan reputacion la ĝeneralkunveno povas ligi la renomon de individuo aŭ asocio/institucio al la asocio nomante tiun honora membro.

*§ 5 Kotizoj*

Kotizojn fiksas la ĝeneralkunveno. La devo kotizi povas esti nuligita de la estraro, ekzemple por membroj netranspagipovaj.

*§ 6 Estraro*

La estraro konsistas el prezidanto, kasisto, registranto kaj maksimume kvar aliaj, el kiuj la unuaj tri estu aparte elekti-

taj. Skribajn proponojn pri kandidatoj akceptu la prezidanto. En okazo de propono de kandidato kiu ne ĉeestos la kunvenon, la kandidatigo validas nur se la kandidato skribe akceptas kaj donas raporton pri siaj antaŭaj laboroj en la Esperanta aŭ geja movadoj. Cetere ĉiu ĉeestanto de la ĝeneralkunveno povas kandidatiĝi en la kunveno mem.

La elektoj validas ĝis la sekvanta kunveno.

La voĉo de la prezidanto estas decida kaze de nedecida rezulto de voĉdono.

La estraro mem dividas la ceterajn taskojn inter siaj membroj, same kiel ĝi povas komisii taskojn al membroj ekster la estraro.

La asocio havu bankkonton. Por ĉiu pago necesas du subskriboj de kaskomisiono konsistanta el la kasisto kaj du aliaj membroj elektitaj de la estraro.

*§ 7 Ĝeneralkunveno*

Ĝeneralkunveno okazu minimume ĉiun trian jaron kaj maksimume ĉiun jaron, ĉu kiel memstara aranĝo, ĉu kadre de alia geja aŭ Esperanta aranĝo laŭ decido de antaŭa ĝeneralkunveno aŭ de la estraro en kazo de neceso.

La prezidanto minimume ok semajnojn antaŭ la kunveno sendu al ĉiu membro agadraporton kaj spezraporton koncerne la pasintan periodon, tagordon de la okazonta kunveno kaj kopion de la alvenintaj proponoj traktotaj en la kunveno.

Ĉiu membro havas unu voĉon, escepte voĉdonoj koncerne statutŝanĝon kaj malfondon, en kiuj nur individuaj membroj havas voĉdonrajton.

La kunveno elektas la estraron kaj la honorajn membrojn kaj difinas la estontan agadon de la asocio.

Membro, kiu ne povas ĉeesti la kunvenon rajtas skribe delegi sian voĉon al alia membro. Ĉiu ĉeestanto povas reprezenti nur kvar membrojn inkluzive de si mem.

Du trionoj de la membraro rajtas postuli eksterordinaran kunvenon, kiun la estraro okazigu antaŭ la paso de kvar monatoj.

*§ 8 Organo*

La asocio eldonas oficialan bultenon, pri kies enhavo respondecas ĝia redaktoro.

*§ 9 Kunlaboro kun aliaj asocioj*

Kun aliaj organizoj, kiuj subtenas almenaŭ unu el ĝiaj celoj, la asocio pretas kunlabori favore al komunaj celoj de la organizoj. Laŭ ĝeneralkunvena decido la asocio povas eĉ aliĝi al tia organizo, kondiĉe ke la komuna agado ne kontraŭas la celojn de L.S.G.

*§ 10 Ŝanĝo de la statuto*

La ĝeneralkunveno povas ŝanĝi la statuton nur per 2/3-a plimulto de la esprimitaj voĉoj, kaj nur se la ŝanĝpropono estis dissendita kun la tagordo.

*§ 11 Malfondo*

La asocion povas malfondi la membraro nur per 2/3-a plimulto de ĉiuj eblaj voĉoj. Eventuala posedaĵo de la asocio estu utiligata laŭ decido de la ĝeneralkunveno konforme al la celoj de la asocio.



## La estraro de LSG agis

dum la pasinta jaro en du okazoj de kontraŭgeja aktiveco. En 23 julio 2005 okazis la unua Parado de fiereco en Latvio, en ĉefurbo Riga. La paradantoj estis atakataj de furiozaj homamasoj, kaj devis esti protektataj per forta agado de la polico. La atako estis ekscitita de la kristana eklezio, ekstremkonservativaj naciistoj kaj eĉ politikistoj. Kaj, kiel jam estas menciita en kelkaj artikoloj en Forumo, okazis novembre 2005 diversspecaj atakoj al paca manifestacio kontraŭ i.a. gejo- kaj ksenofobio en Poznano, Pollando (polica perforto, manifestacia malpermeso de la aŭtoritatoj ktp). Nia prezidanto Arnold Victor raportas jene:

Mi bedaŭras raporti, ke niaj provoj interveni en la kontraŭgejaj agadoj en Latvio kaj Pollando restas senrespondaj. En Latvio la kontaktoj, kiujn ni serĉis, ne respondis; lingva nekapablo eble pro tio respondecas. En la kazo de Pollando, la diplomatiaj instancoj probable ne respondas al ĉiuj eksterregistaraj instancoj.

La protestrezolucio al la dua okazintaĵo aspektis jene:

”Ni, Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG) kun plurcent membroj el 40 landoj akre protestas kontraŭ la ago de polico en kunlaboro kun politikistaj fortoj dum ’marŝo de ...’ en Poznano la 2-an de oktobro 2005! Ke tio povas okazi en naskiĝlando de Esperanto, lingvo de toleremo kaj pacamo vere ŝokis nin. LSG, laŭ nia statuto, organizaĵo, kio batalas por toleremo neniam ignoras tiujn agojn, kiuj kontraŭas homajn rajtojn en Eŭropa Unio, kie loĝas granda plejparto de nia membraro! – nome de LSG:
Arnold Victor, Novjorko, prezidanto”

## Beletra niĉo

*Sinjoro el Hispanio verkis jenan ”krimpoemon” kaj sendis al Forumo:*

LUNPLUVO
(kanto)



Ĉar vi estis sur la sablo
kiam mi alvenis la plaĝon,
pro tio mi ploris
glacilarmon kiel ponardo.

La suno kuŝadis trans la maro
kaj Luno vekiĝis el sia sonĝo.
Per arĝento ĝi akvumis la nokton
kaj milionojn da steloj naskis;
noktaj edelvejsoj,
super la pinto de via monto.

Ĉar vi estis sur la sablo
kiam mi alvenis la plaĝon,
pro tio mi ploris
glacilarmon kiel ponardo.

Diru al mi, kara: kial viaj okuloj
jam ne estas steloj?
Via rigardado rekte venas al mi,
sed viaj okuloj ne plu vidas.
Kial viaj okuloj
jam ne estas steloj?
Ilia brilo mankas…

Ĉar vi estis sur la sablo
kiam mi alvenis la plaĝon,
sur sangflako,
pro tio mi ploris
glacilarmon kiel ponardo.


*Simajro Nneer*



# Ministrado de Manĝaĵo por la Animo

*Ĝeraldino Vrajto prezentas ĉi tie pastraron, kiu, akceptante samseksemulojn, proklamas la bonajn novaĵojn de Jesuo Kristo.*

Pro samseksemofobio en eklezioj gesamseksemuloj malfacile povas kulti ne kaŝante tiujn, kiuj ili vere estas. La Universala Kunularo de Metropolitanaj Komunumaj Eklezioj (UKMKE), kune kun kelkaj aliaj eklezioj, provizas kultajn lokojn kie ĉiaj adoruloj bonveniĝas kaj akceptiĝas kiel ili estas. Sed ĉi tiaj eklezioj estas malmultaj kaj multegaj gesamseksemuloj ne loĝas proksime al tia. Tial ni starigis TTT-ejon kiu alportas al gesamseksemuloj, kie ajn ili estas, la mesaĝon ke Dio nin amas egale kiel aliseksemulojn. Ni ne devas ŝanĝi nian seksan orientadon por adori Dion.




Nia TTT-ejo priskribas kiel fariĝi kristano kaj kiel fariĝi pli bona kristano. Ĝi havas kontempladojn spiritajn, preĝojn kaj devotaĵojn. Ĉio estas samseksemulojn akceptanta. Ĉar ni scias ke multegaj kristanoj ne parolas la anglan, ni havas multajn lingvojn en la TTT-ejo, Esperanton inkluzive. La retpaĝoj troviĝas ĉe: http://soulfoodministry.org – la anglalingva paĝo. Tie vi trovas ligilojn al la lingvoj hispana, portugala, franca, rusa, germana, afrikansa, Esperanto kaj al la ĉina.


La du plej gravaj artikoloj estas ”Samseksemo kaj Biblio” kaj ”HIV/Aidoso: Ĉu verdikto dia?”. ”Samseksemo kaj Biblio” diras ke pli atentema legado de la Biblio kontraŭdiras la aserton, ke ”La Biblio kondamnas samseksemon.” ”HIV/Aidoso: Ĉu verdikto dia?” diras ke Aidoso ne estas puno sendata de Dio. Ĉiu samseksema viktimo de ”Biblia atako” devas legi ilin. Neniu havas la rajton nin forpeli de Dio.

Interalie ni ankaŭ havas devotaĵajn mesaĝojn uzeblaj je Karesmo kaj Advento. Tie estas artikoloj pri kiel preĝi kaj kiel legi la Biblion. Vi trovos koneksojn al samseksemulojn akceptantaj eklezioj kaj al preĝadoteamon. Nuntempe la teamo povas ricevi petojn de preĝo en angla, hispana, portugala kaj franca lingvojn. Iu kiu volas sendi peton de preĝo en Esperanto povas sendi ĝin al mi <gw_grin(ĉe)yahoo.com> aŭ al TTT-ejo <sitecomments(ĉe)soulfoodministry.org> Mi tradukos ĝin kaj sendos al la teamo.

Ni bonvenigas ĉiun leganton. Ni ankaŭ bonvenigas ĉiun voluntulon kiu volas helpi. Ni bezonas tradukistojn, tradukokontrolistojn kaj verkistojn. Se vi interesiĝas pri iu ajn de ĉi tiuj taskon, kontaktu min ĉe <gw_grin(ĉe) yahoo.com> aŭ <sitecomments(ĉe) soulfoodministry.org>

*Ĝeraldino Vrajto*

*Tradukokunordigisto ĉe Ministrado de Manĝaĵo por la Animo*



## Mia transmigranta animo (2):

# En Egiptio - dum la 18-a dinastio.

En tre granda kanboato sur la Nilo
- kredu min, mi ne mensogas, kara mia filo -
en la, ardevarma sufokiga suna brilo
staris mi kun granda pluma ventumilo,

Sidis en boato sur la pompa ora trono
Tut-ank-Amon – nia reĝo, faraono,
rave bela, juna, slimstatura,
dorserekta, bruna, longekrura.

Iufoje dum sekundo li min gvatis,
li sendube mian korpon ŝatis,
levis li subite la okulojn siajn
kaj eĉ tre afable enrigardis miajn.

Poste - haltosignon al la boatremantoj,
ordonon al la multaj vivdrabantoj.
Post tre etaj movoj nur de liaj manoj
- ĉiuj malaperis en la bordaj kanoj.

Li ekstaris, li malligis sian koksotukon,
genuigis min kaj klinis mian nukon!
Mi - la tiam aĉa, povra, sklava nulo,
tuj estiĝis lia knaba amindulo.

Ho, la daŭro de tiu ĉi mirinda la afero
havis tre teruajn sekvojn - je la vero!
tre subite mortis li dum vespermanĝo,
eble per la ĉefpastora helparanĝo.

Samvespere akraj bruoj el ŝtuparo,
sturmis en la ĉambron soldataro,
iu tuj al mi direktis akzan frapon,
kiu fulmrapide plendisfendis mian kapon

Tut-ank-Amon oni lavis, ŝmiris, vestis
kaj dum tri miljaroj li trankvile restis
en la cedra granda ĉerko orekovra.
Ĉerko mia estis pli hontinda, ege povra

ĉar – vespere post la lasta sunobrilo
la kadavron mian oni ĵetis en la Nilo
La stomako de tre granda krokodilo
estis simpla, aĉa ĉerko mia - kara filo
Tia estis mia vivo - iam - borde de la Nilo!

 daniel

## Retaj novaĵoj

Satoru el Japanio sciigis, ke lia retpaĝo Ĉielarka Kafejo havas novan adreson: http://www1.odn.ne.jp/snisikaw/

Lia paĝo por informoj pri LSG ankaŭ havas novan adreson: http://www1.odn.ne.jp/snisikaw/doc/lsg_jp.html

Adonis el Brazilo preparis liston de la plej gravaj senpagaj softvaroj (komputilaj programoj) kiuj estas disponeblaj en la reto. Li petas, ke ni diskonigu la paĝon ĉar gi ankaŭ celas diskonigi Esperanton: http://monda.us/doc/spsoft.htm